

KROMOSOMOJ



Lorjak

Kromosomoj

Kromosomoj

Lorjak

romano

Kromosomoj

Eldono de Flandra Esperanto-Ligo



n-ro 10 en la serio "Stafeto"

Tiu ĉi e-libro estas nekompleta provversio kaj rajtas esti kopiita.

Antaŭparolo

Lorjak, la mistera verkisto. Mistera dum longa tempo, almenaŭ por la neinicitoj, almenaŭ ĝis kiam li permesis malsekretigi sian identecon: J. Mahé, parizano, laŭprofesie fotisto, siatempe disfamiĝinta kiel aŭtoro de la unua originala, longdaŭra filmo en Esperantujo: Angoroj.

En la verka kampo Lorjak debutis (laŭ mia scio) en la unua parto de la sepdekaj jaroj, pere de iuj rakontoj en kelkaj gazetoj. Lia unua romano, Neologisme, aperis en 1975. Kaj tuj nia kritikistaro miris, iom perpleksiĝis sed finfine laŭdis. Foje apologie. Pro la surprize nekutima temo en esperantista fono, pro la piroteknike aŭdaca lingvaĵo, pro la tipe franca, ĵongle sprita humuro. La postan jaron sekvis Transe, denove malŝablona temo, neverŝajna sed nepre originala intrigo, eksplodo de senbrida fantazio. Kaj sekve, intermite, pli-malpli ĉiun duan jaron, jen Retoj, Regulus, Iluzioj (novelaro), Eŭlalia, Mariagnes.

Kiel Nemere, en ĉiu sia romano Lorjak alfrontas unu specifan problemon, jen lingvan aŭ stilan, jen sociologian aŭ etikan, jen (para)psikologian aŭ magian.

En ĉi tiu verko la temoj estas du: artefarita fekundigo (gravedigo) kaj, precipe, ĉu la gepatraj ecoj (ĉikaze murdinstinktoj) estas heredeblaj aŭ ne.

Sed ne tro fidu la seriozecon de la temoj; Lorjak ja estas iele Schwartz-disĉiplo...

Leĝera, distra literaturo, oni diras. Ja, povas esti, sed en ĉiu literaturo tiaĝenraj verkoj svarmas. Kaj furoras.

Krome, en ĉiu verko de Lorjak Esperanto – kaj tipe Esperanta etoso – signife rolas, dise, spice. Kiu asertis, ke originale, aŭtonome Esperanta kulturo ne ekzistas?

Lasta atentigo: en ĉiu libro de nia pariza romanisto aperas la nomo "Kokoso". Kion ĝi signifas, implicas, aludas? Mi scias, sed ne malkaŝos.

Finfine Lorjak estis, kaj volas resti, iom enigma aŭtoro.

Aldo de'Giorgi

Kulinaraj instrumentoj, virinaj subvestoj – kaj Esperantaj romanoj

Intervjuo de Vilmos Benczik kun Lorjak



Lorjak! Antaŭ la apero de "Neologisme", oni ne konis tiun nomon. Cetere, ĝi estas evidente pseŭda. Kio estas la vera?

– Same evidente, se mi deziras diri ĝin, mi ne estus elektinta pseŭdonimon. Cetere, tio estas nepre seninteresa, ĉar mia denaska nomo estas tute ne konata, krom de personaj amikoj.

Ĉu do vi faris nenian Esperanto-agadon?

– Jes, ja. Sed modestan kaj limigitan. Kunlaboradon al "Franca Esperantisto" antaŭ kaj tuj post la milito, rubrikon en tiu revuo. Dum mia junaĝo, kvarlernantajn kursojn en suburba lernejo de la "Laborista universitato". Amatorajn kaj malbonajn. Kiel pedagogo (!) mi hontinde estis unu el tiom da pseŭdaj "fak"-delegitoj, kiuj trompe embarasas la movadon. Ĉiu faru sian metion!

Tamen, kiel verkisto vi jam aperis antaŭ dudeko da jaroj. El "Illuzioj", tiu

kolekto da noveloj kiun Hungara Esperanto-Asocio ĵus eldonis, kelkaj aperis en "Monda Kulturo" ĉirkaŭ la jaroj 1964/65, ĉu ne?

– Jes. Sed mi jam verkis multe pli frue, kiam sub la instigo de l' tiama franca kaj salutinda Prezidisto Pierre Petit mi impetis en la unuan felietonon en Esperanto, kiu titoliĝis "Retoj", por "Franca Esperantisto". Bedaŭrinde, pro ŝanĝo de l' prezidistoj, la unua konduto de l' nova konsistis el abrupta ĉesigo pri ĉio, iniciatita de lia antaŭulo. Tial, la fidelaj legantoj de F.E. neniam konis la finon (por kiu ili pagis) de "Retoj". Necesis la aprezo de V. Setälä en 1978 por ke la eldono de "Retoj" venu kompensi tiun literaturan vandalismon. Pro kiu mi kabeiĝis dum 15 jaroj...

Kun kia rezulto?

– ... ke neniu skandaliĝis. Kaj ke mi punis nur min mem. Sufokoscedante kvazaŭ fiŝo, ekster akvo pro manko de Esperantaj okupoj. Ĝis, kiel nekuracebla drogito, mi sendis al la Esperanto-Fondumo la tekston de "Neologisme", kiun mi apenaŭ deziris montri pro la konvinkiĝo ke sen personaj rekomendoj oni neniam akceptus ĝin en tiu medio de blankbarbuloj, tial ke tro fantazia. V. Setälä demonstris al mi la malon tuj kompostigante "Neologisme", kaj tio estis la komenco de reviviga feliĉo, kiu kondukis al "Transe", al "Retoj" ĉe li – al "Regulus" ĉe Lina Gabrielli, kaj al "Illuzioj" ĉe vi.

Ĉu tio aŭgurigas pri sekvo?

– Jes: "Mariagnes" nun preparata kaj kiu atendas eldoniston.

Ni komentu vian lingvon. Kial vi uzas vortojn kiel "Paris – Roma – London" anstataŭ "Parizo – Romo – Londono"?

– Ne instigu min paroli pri lingvistiko. Kiel manlaboristo, mi havas neniun kvaliton por tio. Mi uzas la Zamenhofan lingvon tia, kia instruis ĝin al mi Cart, Bastien kaj Bobin. Ĝi estas kodo, kiun mi adoptis, kaj mi obeas la direktivojn de kompetentaj instancoj akademiaj, kiuj regas ĝin ¹. Nu, koncerne la proprajn nomojn, oni ne povas nei ke la lingvo ne estas fiksita. Kaj Paris, Roma, London estas propraj nomoj. Ne sufiĉas aldoni "o". Se jes, kiam oni diros Bencziko, Tonkino, Bultono, mi diros Parizo, Londono malgraŭ la monotoneco. Demonstras la nunan fantazion de la

lingvo la adreslibro de SAT, kie mi legas sur la sama paĝo Pantin kaj Parizo – aŭ Romo kaj Rosenheim. Kial ne Pantino kaj Paris, Roma kaj Rosenhejmo? Des pli ke la solvo de la afero kuŝas sur tasko eble longa, sed simpla. Oni prenu maplibron kiel ekzemple tiun de l' "Readers Digest", kiu entenas la nomon de ĉiuj urboj, eĉ plej etaj vilaĝoj, de la mondo, kaj starigu vortaron de tiuj nomoj. Tiam mi discipline obeos ĝin. Nuntempe, sen lingvaj pretendoj mi adoptis la plej simplan solvon: uzi la nomojn tiaj kiaj ili estas. 90 procentoj estas prononceblaj en Esperanto. Tiamaniere, mi ne bezonas memori du: unu por la interna bezono, kaj dua por la poŝto.

Oni riproĉas al vi lingvajn "strangaĵojn".

– Kiujn oni frontigas al la "kutimoj". Mi abomenas la kutimojn, kiuj kuŝas sur la memoro pli ol sur la mekanismo de Esperanto. Mi diras "prezidisto" ĉar -isto esprimas funkcion aŭ metion, dum -ant rilatas al momenta ago nun. Mi diras mie, vie, nie, ĉar tiam mi pensas adverbe, kaj plenrajte malgraŭ la grumbloj de l' korektistoj. Mi diras "ridero" kontraŭ la kutimo, malgraŭ "rideto", kiu devus signifi malgrandan ridon, sed pro tiu kutimo (ve) afablan grimaceton. Mi diras "paŝari" por piediri per multaj paŝoj, eĉ se neniam oni vidis tiun vorton antaŭe. Zamenhof mem deklaris, ke la neofteco ne estu kaŭzo de neuzo. Mi ne pretendas per tio starigi skolon. Tio ne povas esti mia rolo. Mi nur uzas la lingvon tia, kian mi lernis ĝin, kun ĉiuj ĝiaj artikadoj. Se ili kaŭzas perplekson, tio stimulas la cerbon; kaj okazas ege malpli ofte ol la elizioj en nia abundo da poemoj.

Sur tute alia tereno: oni diras vin reklamfotisto. El kio konsistas tio?

– Seria fotado de objektoj, ĝenerale de ĉiuj elementoj de katalogoj. Irante de la kulinaraĵ instrumentoj al la virinaj subvestoj.

Mi aŭdis pri kino...

– Filmado estas formo de foto, laŭ la utiligo. Oni ne povas demonstri maŝinon per katalogo. Tiam, mi filmas ĝin.

Ĉu tiun kapablon vi neniam metis je la servo de Esperanta afero? Eĥoj venis al miaj oreloj, ke en La Hago... en 1964, oni prezentis...

– En Den Haag oni "prezentis" nenion. Kaj viajn "eĥojn" vi tre embarasus,

se vi petus la nomon de la prezentisto. Cetere, neniam kaj nenie, krom en Britio, oficialaj instancoj instigis al prelego aŭ artikolo pri tiu naiva entrepreno. Kредu min, paroli pri mortintoj, naturaj aŭ murditaj, ne revivigas ilin. Ni lasu ili dormi. Cetere, vi devis min intervjui pri literaturo, ĉu ne?

Vilmos Benczik

Bernard Dubosk dormetis en la komfortaj brakoj de voluptiga ripozfotelo. Kaj en la bondigesta kvieto de dimanĉa tagmezmanĝo. Ne malproksime, Mirela cerbumis super problemo de krucvortoj, kiu sulkgis ŝian frunton de pulpa blondulino blankiĝanta. Kun kubuto sur tablo, kaj fingroj esplorantaj la hararon, ŝi vane ripetis por si mem: “preludo al la posttagmezo de faŭno — per ses literoj! Kio ĝi estas?” De tempo al tempo, ŝi oblikve okulturnis al sia najbaro, sub la tikla bezono asocii lin al la solvo de tiu enigmo. Sed ŝi akurate bremsis siajn gestojn. Ne necesis rompi tiun dormon de dorlotata viro. Trude vekite, li rajtus malgraŭ sia escepteca indulgo malbonhumori por la tuta cetero de l' tago.

Post kvardek jaroj da komuna vivo, Mirela sufiĉe konis sian kunulon por aserti, ke lia karaktero havas plu nenian sekreton por ke ĉiujn reagojn liajn ŝi povus anticipi diveni sen risko de eraro. Precipe, ke atenco kontraŭ lia dimanĉa siesto preskaŭ egalus sakrilegion. Ne dubebliis, ke en unu lumfulmo li kapablus ĵeti la ses literoj por “preludo al la posttagmezo de faŭno”. Sed tia elĉerpo de sia perplekso ne valoris la rompon de meritita dimanĉripozo, post semajno da ŝarĝa laboro.

Ja Bernard Dubosk estis oficiale emerita. Sed post vivo, kiun li perlaboris kiel kasisto en superbazaro — “La Komerca Faktorio de Bretonio” — kun tiuj respondecoj kaj danĝeroj de tia posteno, lia subita senokupeco de pensiulo lasis lin netolereble ŝanceliĝa. Tiam 65-jara, li sentis sin ankoraŭ fortoplana, kaj avida je aktivaj kapablaj plenigi la vakuon de vivo sen aliaj perspektivoj pli stimula ol malrapida survojiĝo al definitiva adiaŭo.

Tial, post ronda esplorrigardo al la profesioj plenumoblaj de viro ankoraŭ ne kaduka, li iniciatis portreti la infanojn en ties lernejoj. Por kompetenta amatoro, tio ne levis gravajn problemojn — nur la aĉeton de materialo nek grandega nek multekosta, eĉ ne la instalon de laboratorio, ĉar la taskojn de riveloj kaj presadoj li konfidus al specialigita entrepreno.

La afero sukcesis. Ĉefe je la komenco, kiam li frontis dum tutaj tagoj klukantajn gregojn da petolaj homidoj. Sed nun 75-jara, Bernard Dubosk ne povis ignori la kreskantan pezon de la materialportado, la strebigon de

la stircirkuladoj, la kapŝveligon de la organizaj problemoj. Li persistis pro kuraĝa obstino, kaj ĉefe ĉar rezignon ensentus kiel kapitulacon sub la ofensivo de neevitebla maljuneco. Ja nun, ĉiusemajne li sopiris al la paŭzo dimanĉa, kiel al necesa reprovizo de fortoj, prepare al la sekvontaj tagoj.

Feliĉe, tiu nervorompa streĉo volatiliĝis en kvazaŭ unublova daŭro, dum li retrovis la ĉirkaŭbrakadojn de Mirela, kun ŝia rideto ankoraŭ sorĉa, ŝia rigardo iome kapabla damnigi sanktulon. De kiam ili vivis kune, li neniam monotonkutimiĝis je ŝiaj diversaj formoj de ĉarmo, kaj la vesperaj revenoj hejmen ankoraŭ havis la freŝecon de l' komenco. Siaflanke, Mirela neniel laciĝis de ilia kunloĝado, emocie elvokis la tagon kiam ŝi renkontis tiun bonkoran viron, plenan je afablaj zorgoj, agrablaj iniciatoj, fizike logan, kaj — nur tio povis ĉion pliampleksigi — provizitan de socia situacio eble senbrila, sed sufiĉe komfortiga. Kompense, ŝi plej sindoneme klopodis, laŭlonge de l' jaroj, por igi glata lian restadon hejme, plenumi la materialajn taskojn de l' ĉiutaga vivo, kaj helpi lin forgesi ĉe ŝiaj flankoj, dommastrume, kulinare kaj... amolude, la stultigan etoson de l' bazara medio.

Notinde, kaj nun pli ol iam pro la konstatebla kresko de liaj penoj fronti sian obstinan okupon de fotisto, plej respektis lian kutimon de l' posttagmeza siesto, dimanĉe. Eĉ repuŝante, ofte, personan deziron de promeno aŭ de alspektado, ĉar evidentis ke tiuj du-tri duondormaj horoj necesis al lia ekvilibro, kaj ke ŝi estis solidare koncernata de ilia malstreĉa efiko. Do, tiun dimanĉon, Mirela mordetis la ekstremaĵon de sia globskribilo super la krucvorta tabelo, dum ŝi tenere rigardis la ripozon de la amato, senkonscie balbutante por si mem: “preludo al la posttagmezo de faŭno... ses literoj... ses literoj...” Supozeble ŝi murmuris pli laŭte ol ŝi intencis, ĉar la dormanto malfermis unu okulon, por grumbli:

- Evidenta: “erekto”!

Ŝi eksaltis — tiom pro la aŭdaco de la solva vorto, kiom pro la skrupulo esti vekinta lin. Sed malŝarĝigita de tiu enigmo, ŝi skribis la ses literojn kun alspiro de kontentigo, dum sia najbaro, ankaŭ siavice liberigita de tiu agaca provoko, flankenturnis la kapon por refali en la momente rompitan dormon. Bedaŭrinde perturbita, ĝi ne plene revenis kaj la viro duonbule observis la gestojn de sia persiste loga kunulino, fronte al ŝiaj krucvortaj

perpleksoj. Pli ol iam aspektis kortuŝa; kun harfasko pendanta super la papero, kun paŭtgrimaceto de knabino, kun perlamotaj ungoj distre tamburantaj sur la tablo. Ŝajne, tiu eŭforiiga spektaklo instigis en li moligajn pensojn, ĉar li kaĉbalbutis, eble pli instinkte ol pripensinte:

- Mirela! Kial ni ne geedziĝus?

Eksplodo povas esti senbrua, se nepiroteknika. Sed tamen restas eksplodo, kvankam nur spirita. Tiuj paroloj, eĉ malfirmaj, eĉ duonmaĉataj, Mirela atendis ilin de kvardek jaroj. Sed feliĉe, malgraŭ la ŝoko de ilia subiteco, ŝi kapablis regi sin: ne ekstari kvazaŭ risorte por salti al la vizaĝo de l' karulo, kovri ĝin per kisoj, disflui en dankovortoj:

- Kara! Kara mia! Kia mirinda ideo! Kiom nia unuiĝo fariĝos pli fascina! Kun kia fiero mi portos vian nomon, montros la oran ringon garantian de nia tiel publike demonstrata amo!

Ne. Tial ke ŝi kapablis dum tiom da jaroj resti diskrete nepostulema, Mirela Sidoret opiniis pli dignofiera konservi interne sian ĝojon. Ekdanci pro entuziasmo estus konfesi, ke la ĵusaj paroloj respondas al kvarcentokdekmonata pacienca atendado. Al avido de iniciato, kiu superfavorus ĉiujn banalajn virinojn. Kvankam ne "banala virino", Mirela povis kiel ĉiuj sopiri al reguligo de situacio, senti bezonon de sekuro staranta sur kontrakto. Sed tian sekuron — sen kontrakto — ĝis nun ŝi ĉerpis en la certeco de ilia reciproka amo, en sia fido al viro, kiu ĉiam montriĝis honesta, sindonema, lojala. Kion plian povus konstrui sur ĉantaĝo ("ni geedziĝu, aŭ mi foriros"), eĉ laŭ la starpunkto de sia reputacio? Ĉiuj nomis ŝin "sinjorino Dubosk". Kial per ŝajno de suspekto krei ĝenan etoson? Cetere, eĉ okaze de nepensenda katastrofo, ĉu la modernaj leĝoj ne pli-malpli validigas la situacion de konkubeco? Kial aludi svagan malfidon?

Saĝe, Mirela Sidoret atendis la tagon, kiam sugesto venus de Bernard Dubosk.

Sed nun kiam ĵus venis tiu sugesto, elmontri tro da emocio aperus kvazaŭ neado de tiu ĝisnuna rezervo, kvazaŭ retrospektivaj riproĉoj pro tia prokrasto de la proponendaj paroloj. Inverse, tamen, gravis ke ŝi nete kaj laŭte agnosku ilin, antaŭ ol riski ŝanĝon de liaj intencoj. Saĝe, do, la

fidela kunulino kapablis senekzalte respondi per mezurataj komentoj,
aspekte senemociaj:

- Geedziĝi? Jes. Laŭ via diro: kial ne?

-2-

Ĉiu tiu parto aperas nur en la kompleta versio de la libro. Mendu la kompletan libron de www.retbutiko.be.

-3-

Ĉiu tiu parto aperas nur en la komplete versio de la libro. Mendu la kompletan libron de www.retbutiko.be.

-4-

Ĉiu tiu parto aperas nur en la kompleta versio de la libro. Mendu la kompletan libron de www.retbutiko.be.

-5-

Ĉiu tiu parto aperas nur en la kompleta versio de la libro. Mendu la kompletan libron de www.retbutiko.be.

-6-

Ĉiu tiu parto aperas nur en la kompleta versio de la libro. Mendu la kompletan libron de www.retbutiko.be.

Oni povas esti moderna virino. Oni povas fronti ĉiutage la plej agresajn formojn de la ĵurnaltitoloj, registri la plej krudajn detalojn de ties raportoj; kvankam delikate virina, kuraĝe gluti la prozon de Balano, sperti senpanike la plej aŭdacajn scenojn de filmo el erotiko ne limigita, havi sufiĉe indulgan koncepton de l' nunaj moroj por senŝanceliĝe trafiĝi de la plej vundaj batoj el alies konsterna konduto, flegme ignori pro snobismo la plej elementajn leĝojn de moralo, reĵetenda ĉar arkaika; oni povas heroisme impeti en la legadon de nekompreneblaj tekstoj en kreitaj lingvoj tiel diversaj kiel ties avangardaj aŭtoroj mem – necesus superhoma forto por kvazaŭ indiferente ekscii, ke oni ligiĝis por tuta vivo kun la filo de horora murdisto universale konata. Indiferente, plenkviete, ne agnoskante la vundopafon.

Mirela ne kapablis afekti bagatelismon – ne pli ol rigide ricevi la ŝokon. Frapita de stuporo, ŝi instinkte glitigis sian seĝon por pligrandigi la distancon de sia edzo. Sed tuj konsciante pri la ofenda signifo de tiu reago, ŝi haltis. Tro malfrue! Li estis rimarkinta la geston. Levis al si fiksajn okulojn en longa penetra rigardo dolorplena. Siaflanke, kaj batalante kontraŭ si mem, ŝi ne povis fronti tian rigardon ne rezistante la impulsan komparon kun tiu alia tiel disvastigita en la gazetaj bildoj. Divenante ŝiajn pensojn, li longe provis ilin legi ĉe ŝia vizaĝo, ĝis li venkite turnis la okulojn oblikven, kun longa elspiro. Ili ambaŭ restis mutaj dum senfinaj minutoj, premegite de peza fatalo; ŝi, en senparola efervesko, kun cerbo bobelanta pro amasego da demandoj. Ŝi tamen unua rompis la silenton. Pli ol diskrete – per timema voĉeto:

- Bernard! Kial vi neniam konfidencis al mi?

Li levis la ŝultrojn:

- Kial? Nu: ĉu tio neniel necesis. La afero estis reguligita, la nomo definitive rezignita. Kial kreeti malagrablan etoson tute senutile?

Denove, ili restis longe enpensiĝantaj. Ĝis ŝi murmuris, kvazaŭ por si mem:

- Kompatinda mia! Kiel vi povis vivi kun la pezo de tia sekreto sen la bezono de elverŝo en amikan orelon?

Li komencis nerviĝi:

- Vi plene elvojiĝas. Ne starigu melodramon. Je la epoko de la eventoj, ili estis dramo por mia patrino, certe. Sed mi estis junulo, kun ties fantazia senrespondeco. Preskaŭ senkonscia. Poste, oni ĉiam nomis min Dubosk, kio por mi estis tute normala. Komprenoble, neniam mia patrino aludis la aferon, nek la tribunalan decidon. Mi des malpli sentis la bezonon de konfidencoj, nek al vi, nek al kiu ajn, tial ke por ignori la aferon mi ne devis peni – ja mi tute ne pensis pri ĝi. Mi ripetas al vi: sen la stulteco de ia burokrato, ĉi ĉio estus definitive entombigita, vi neniam aludus pri ĝi, kaj certe ne sentus la neceson instigi al cerbumadoj nur kruelaj.

Bernard estis regajninta energion. Ekstaris:

- Ĉefe, tio ne rajtas prokrasti la vespermanĝon. Enirante mi flaris bonodoron. Ĉu ne el anaso?

Ankaŭ Mirela ekstaris. Por disblovi ĝenan etoson, ŝi iris ĉirkaŭbraki la amatan edzon, kun longa kiso de varma virino. Komplice:

- Jes, anasaĵo, frandemulo mia. Venu.

Ŝi helpis lin demeti sian veŝton, kiun ŝi pendigis en la koridoro. Kaj ili iris sidiĝi unu kontraŭ la alia, ambaŭflanke de la kuireja tablo. Per kutima gesto, metis la pladon de anasaĵo antaŭ lin:

- Nu, vi distranĉu ĝin!

Svingante la grandajn forkon kaj tranĉilon, Bernard entreprenis dissekti la rostaĵon, kun zorgoj de ĉefkelnero. Sed sub subita impulso, Mirela tuj bedaŭris sian ordonon. Pala, ŝi nerezisteble nun elvokis, ne la metiecon de kelnero, sed la sciencon de kirurgo, konstatante per kiu teknika scio li kapable tranĉis ĉe la artikoj, elprenis kvazaŭ bisturie ĉu kruron, ĉu flugilon de la birdo, kun precizo kaj lerto de spertulo, kun instinkta sento pri la anatomio. Estis vere neeble repuŝi la paralelan bildon de la horora dispecigo de virinaj korpoj laŭ multegaj fragmentoj bruligotaj en forno mokinde malgranda. Kontraŭvole, ŝi distance rektiĝis, kiam li prezentis al

ŝi la pladon:

- Ne, dankon. Ĉar vi venis malfrue, mi estis jam manĝinta. Cetere leĝere, ĉar mi sentis min ne bone. Mi kredas, ke la anasaĵo naŭzetus min

Kvankam tio estis evidente ne vera, Bernard estis tro edze egoisma, kaj tro frandema, por plu informiĝi. Li ne insistis:

- Estus bedaŭrinde, ke vi ne gustumu tiun anasaĵon. Feliĉe, ĝi estos morgaŭ eĉ pli bona post revarmigo.

Kaj li servis sin. Nun, rilaksiĝinta, li delekte omaĝis la rafinitan kulinaron, manĝante la kuiradon speciale preparitan por plezurigi lin. Sed siaflanke Mirela vere ne havis plu apetiton. Malgraŭ si, ŝi ne povis deturni sin de esploro por komparoj. La portreto de Landru estis sufiĉe karakteriza kaj disvastigita por ke ŝi estu konservinta ĝin, preskaŭ precize, en la memoro. Jen li havis etajn okulojn nigregajn en profundaj orbitoj Bernard havis ilin bluverdaj kaj neniel malkvietigaj. Inter du glutadoj, ŝi ŝtelstrabis al lia mentono. Mentono tre lie propra, kun profunda fendo vertikala, kiu iel similigis ĝin al pupopostaĵo, laŭmodele de Kirk Douglas. Kia povis esti la mentono de Landru? Maskita de densega barbo, ĝin oni ne konis. Landru estis kalva – Bernard ankoraŭ ne. Sed li tro ofte plendis pro la abunda perdo de siaj haroj. Kaj kalviĝo estas hereda afekcio, ĉu ne?

Instinkte, Mirela sentis la bezonon fari aliajn komparojn, la orelojn, la buŝformon, ktp... Sed konsciis, ke ŝi ne sufiĉe konis la modelon por persisti sur tiu danĝera vojo. Se ŝi ne kapablus definitive forpeli tiajn deprimajn pensojn – kio estus la plej saĝa konduto – tiam necesus, ke ŝi studu dokumentojn. Sed ŝi ne povis ignori ondon de malvarmo, kiu trakuris ŝian mjelon.

Kaj la vivo fluis. Preskaŭ normale. "Preskaŭ, ĉar el tia ŝoko oni ne povas restarigi sen spuroj. Ja Bernard akurate foriris ĉiumatene por viziti siajn klientajn lernejojn, tiel serene kiel antaŭe. Rehejmeniris vespere same serene. Kaj same serena. Sed Mirela, kiu de l' tagoj restis sola, frontante siajn pensojn, ne tiel facile kapablis reveni al la antaŭa sencerbumeco. Pli juna ol sia edzo, ja ŝi ankoraŭ ne estis en la mondo je la epoko de la "afero Landru". Ĝin ŝi konis nur per konfuzaj eĥoj el gazetaj aludoj. Laŭ nebula memoro, ŝi certe iam legis artikolon en ia magazino. Ankaŭ spektis filmon, pli-malpli fidelan. Neniun detalon, neniun precizan fakton ŝi kapablis mencii. Nur emerĝis el ŝia cerbo, svage, malneta bildo de la nigra barbo, de la malkvietigaj enkavaj okuloj. Sed ĉi ĉio ne povis sufiĉi al ŝia nuna mensostato. Ŝi nepre bezonis konsideri la situacion, plenkonscie de ĝiaj elementoj, ĉar sisteme fermi la okulojn povus nur ĉiamigi konfuzan etoson, promesplenan de surprizaj riveloj, konstantajn minacojn el neatendita fonto. Nu, kiamaniere revizii la aferon? Esplori tiamajn gazetojn? Eĉ la malplej skandalemaj alportus nur interpretadon tra la verkemfazo de ĵurnalisto. Ŝi malfidis babilaĵojn. Ŝi deziris, ŝi rajtis precizajn, bazajn, detalojn. Ilin esperante, ŝi plenumis la ideon publikigi anonceton en historia revuo:

"Por ĵurnalistaj celoj, provas trovi informojn aŭ dokumentaron pri la afero Landru. M. Dubosk, ps. 3172 – PARIS"

Post kio si atendis. Ŝi ne estis hezitinta mencii sian nomon, ĉar la diskreteco de luita poŝtŝkatolo sufiĉe garantiis sian privatecon. Do, ŝi atendis, atendadis, en tiu agaca sento de neago, de senefiko, tre tikla dum oni pretus skui la mondon por havi rezultojn. Dependi de aliaj por ekagi; voli konstrui ion, kio staru sur alies manifesto, tio estas nervotorda des pli akre, ju pli daŭras la silento. Kaj Mirela devis lukti por ne montri sian malpaciencon, resti rideta kaj serena apud tiu edzo, kiu siaflanke ŝajnis tute forgesinta la incidenton. Evidentis ke, se ĝi iam perturbis ilian geedzan vivon, lia pozicio estis de definitiva ignoro, de volego nepre forgesi – kaj forgesigi – la neoportunan rivelon. Tio estis tiel okulfrapa, ke Mirela zorge evitis ĉion, kio povus vekti suspekton lian, pri scivolemo, kiu des pli kreskis, ke la poŝta ŝkatolo restis malplena. Ŝi sentis, ke ilia

momenta feliĉo kuŝas sur reciproka prisilento, kaj ke okaza aludo al ĝiaj cerbumadoj estus el la plej supera mallerteco. Ŝi do pasive prizorgis plu la hejman etoson, daŭre dorlotadis la karan edzeton, kiun, dum la tempo fluis, ŝi malpli kaj malpli inklinis kompari kun la konfuza elvoko de l' fama murdisto. Ŝi senrezerve partoprenis lian vivon, vizitis aŭ invitis amikojn, iris al spektakloj, redonis karesojn, kaj ne ofte elvokis vampiron, ferminte la okulojn sub liaj amoraj grimpoprovoj. Tamen, kiam tio okazis, tremetis malpli pro timo ol pro sento de pitoresko. Al ĉio oni kutimiĝas. Sed, matene, ŝi malpacience atendis lian eliron por kuri al la poŝtoficejo esplori la skatolon n-ro 3172.

Pro la monotoneco trovi ĝin kutime malplena, Mirela sentis korŝokon, tiun matenon, kiam ŝi videtis ion blankan tra la klaptruo. Kun febraj manoj, ŝi rapidis malfermi leterkoverton je ŝia nomo. Ĝi entenis papereton kun nur telefonnumero:

726-80-32

Tiu fina vivsigno estis tiel incita, ke ŝi ne kapablis atendi la revenon hejmen por kunmeti la numeron. Ĝin ŝi faris tuj en la poŝtoficejo. Aŭdis senkoloran voĉon virinan:

- Sinjorino... Mi supozas vin ĵurnalistino. Ĉu?
- Hm...! Je... Jes!
- Ĉu mi rajtas pensi, ke vi havas gravajn motivojn por informiĝi pri la "afero Landru"?
- Kompreneble!
- El rekta fonto?
- Preferinde. Jes.
- Bone. Ĉu ni povas rendevui?
- Kiam kaj kie vi volos.
- Mi proponas la biertrinkejon "Colmar", apud la norda stacidomo. Ĝi

konvenas al vi?

- Jes, ja. Ĉu hodiaŭ, je la tria posttagmeze?

- Bone. Mi side antaŭos ol vi. Vi rekonos min per mia griza pluvmantelo. Miaj haroj estas blankaj. Do, ĝis posttagmeze!

Oni rekroĉis. Iom emociita, Mirela revenis hejmen kun la kapo taŭzita de imagoj kaj supozoj. Notinde, devis per persista memkonvinko instali sin en la rolo de ĵurnalistino. Kaj ĉar subite la okazoj neatendite ekrapidis, ŝi timis ne havi sufiĉan tempon por starigi personecon, kiu ne levus suspekton. Sed tio vekis tiom da atentigoj, ke fine ŝi supergutite rezignis ĉiujn por malpacience atendi la horon de l' rendezuo, bremsante sin por ne alveni unua, kontraŭ la interkonsento.

Kiam ŝi eniris la trinkejon, ŝi ne povis heziti. Tuj apud la pordo, la virino sidis malantaŭ bierglaso. Jen estis, rekoneblaĵoj ne erarigaj, la griza mantelo, la blanka hararo. Mangeste ŝi invitis Mirela'n eksidi fronte al ŝi. Ŝi estis altstatura maljunulino, eble 60-jara, preskaŭ eleganta – almenaŭ komforte vestita, kun rigardo rekta, videble ne impresebla. Ŝi tuj atakis iom severe:

- Antaŭ ĉio, mi devas deklari al vi, Sinjorino, ke mi neniel deziras perdi mian tempon, nek perdigi vian, per superflujaj babiladoj. Se la klarigoj, kiujn mi povas doni al vi, estas ĝenerale ne originalaj, tamen kelkaj estas tre personaj. Tial mi nepre intencas ne malŝpari ilin al iu ajn. Vi diris vin ĵurnalistino, kiu deziras dokumentojn pri la afero Landru. Por kiu gazeto?

Mirela estis preparinta sin al tiu demando. La respondo estis preta:

- Por la revuo "MONATO".

La virino levis la brovojn.

- "MONATO"? Mi ne konas.

- Internacia revuo. Tutmonde konata kaj legata.

La vorto "tutmonde" efikis:

- Eble mi estas naiva. Sed vi estas apriorie simpatia, kaj mi bonvolas fidi vin. Mi estas Karolina Segret, la filino de Landru.

Mirela ne povis reteni eksalteton. Kiu elvokis malafablan rigardon de ŝia najbarino:

- Ne rigardu min kiel la diablon. Mi nek voros, nek bruligos vin! Konsentu, ke mia rekta sinprezento, sen indulgo al viaj antaŭjuĝaj oreloj, demonstras mian intencon de seriozaj komunikoj al serioza persono. Jes, Landru estis mia patro.

Post la unua ŝoko, Mirela restis suspektema:

- Sed... laŭ mia scio, li havis nur filojn...

La virino grimacetas, videble agacite:

- Oficiale, jes! Sed mi estas la filino de Fernanda Segret, la lasta virino, kiu vivis kun li, kiam oni arestis lin. Tial, mi portas ŝian nomon.

Ŝi levis la ŝultrojn:

- La mondo estas tiel malica!

Invadita de pensoj, ŝi ŝajnis forgesinta la ĉirkaŭejon, kun rigardoj preteren:

- Ja Landru nekontesteble estis trompisto. Mia patrino mem ekkonis lin sekve de mensoga edziĝanonceto, kiajn li publikigis centojn. Sed la miraklo estas, ke ŝi tamen profunde enamiĝis al li. Kaj neniam konsentis kredi lin kulpa.

Ŝi stretis la makzelojn:

- Ŝajne, li plurfoje ŝtelis. Jes. Sed mia patro ne estis murdisto!

Mirela interne kontentis, ke ŝi renkontis tian rektan fonton de informoj. Sed agnoskis, ke ŝi ne paŝas sur senpartia tereno. Kaj ke devas domaĝi la sentojn de sia dialogantino. Ŝi singarde konstatis:

- Sed... ĉiuj aliaj virinoj, kiuj rilatis kun li, estis same konkeritaj de lia ĉarmo. Ŝajnas, ke li estis eksterordinara loganto. Laŭ atestantoj, ilia unuiĝo estis ĉiam admirinda. Almenaŭ ĝis la tago, kiam la virino malaperis...

Karolina Segret seke rebatis:

-...Malaperis kun dek kvar aliaj kremaciitaj en malgranda forno, kies fajrujo havis proksimume la volumenon de kaserolo? Ĉu tio ŝajnas al vi kredebla?

Embarasita, Mirela substrekis mienon de decidita nearaleco. Fronte al iu tiel penetrita de sia temo, kaj tiel energie – preskaŭ atake – esprimanta sian konvinkiĝon, saĝo volis, ke oni evitu provokan debaton. Tamen, estis malfacile ignori la ĝeneralan akcepton de la tiama verdikto. Kun timigita voĉeto Mirela riskis:

- Laŭ vi, do, la proceso de Landru...

- ...Estis la plej monstra skandalo de l' jarcento. La tipo mem de neriparebla justica eraro, juĝo bazita nur sur supozoj. Neniun determinan indicon oni trovis kontraŭ mia patro. Nepre neniun pruvon. Eĉ morale, li malpravigis ĉiun suspekton de krimeco. Ĝis sia lasta tago, mia kompatinda patrino ripetis al mi kiom estis tiu viro fajna, dolĉa, kaj komprenema. Delikata poeto, certe. Kapablis reciti parkere tutajn poemojn de Musset. Volonte citis partojn de "Faust", de "Manon"; Vera melomano, ĉu li kapablus esti aĉa murdisto, por heredoraboj? La bazo de lia kondamno, nur subjektiva, estis psikologie ne akceptenda.

- Tamen, la ducent okdek edziĝanoncetoj...

- ...Demonstris kion? Nekontesteble, bedaŭrindan inklinon de fimaniulo. Kulpo certa, sed senproporcia kun la ŝarĝo, kiun oni akumulis sur lin. Cetere li neis – persiste, obstine neis, protestis, batalis paŝon post paŝo por savi sian vivon – ĝis humure sarkasmi: "Pardonu, Sinjoro Juĝisto, sed mi povas donaci al vi nur unu kapon!"

Mirela sentis sin konfuzita. Ŝi estis veninta ĉi tien sen duboj, konsiderinte la aferon definitive netigita, eĉ ne supozante, ke ĝi ankoraŭ povus esti temo de debato. Sed la impeto de Karolina Segret estis ekŝancelanta ŝin.

Tamen, ŝi starigis demandon:

- Laŭ vi, la dek kvin virinoj...?

Karolina nervoziĝis:

- Mi respondos kiel mia patro antaŭ la tribunalo: "Oni riproĉas miajn rilatojn kun preskaŭ tricent virinoj. Kaj mi estus murdinta NUR dek kvin?"

Ŝi rigardis Mirela'n kun mikso de ironio kaj de kompato:

- Ĉu vi neniam aŭdis pri la organizita sklavigo de blankaj virinoj? Kial la mistero de deko da malaperoj koncernus "nin"? Zorgu la familioj kaj la polico. Ĉefas nur, ke neniun pruvon oni povis alporti kontraŭ mia patro. Lin oni indigne kondamnis sub la nura premo de popolaĉa opinio kaj de ĵurnalistaj kampanjoj. Tio preterpasis la talenton de la plej famaj advokatoj, kiuj povis nur, kvankam brile, stigmatizi tiun malserenan etoson, elvoki la kriindan mankon de pruvoj!

Ŝi estis solidare dirinta "nin", parolante nome de viro, kiu havis la reputacion de unu el la plej gravaj krimuloj de la homa historio. La voĉo de la sango ne povis sufiĉi por klarigi tiun defion. Fakte estis, ke Landru'n oni ekzekutis pro multegaj suspektindaĵoj, sed ne pro iel pruvitaj murdoj; kiel li mem malvarme respondis al spektantino, kiu insultis lin el sia sidloko:

- Montru al mi la kadavron, kara Sinjorino!

Kaj tiu konstato – kun siaj logikaj konkludoj – alportis iom da komforto al Mirela. Se sia bopatro estis blanka, malgraŭ la socia juĝo, kial lia posteularo restus makulita de hereda fatalo pli-malpli science demonstrita? La evoluo de sia mensostato tiel lume pentriĝis ĉe ŝia vizaĝo, ke ŝia frontantino, rimarkante ĝin, ne povis ne rimarkigi, malfide:

- Ĉu vi vere estas ĵurnalistino? Ne mokas min?

Kaj post rezignacia ŝultrumo:

- Kaj cetere... kiel gravas? Ĵurnalistino aŭ ne, se vi aŭskultis min, kaj kapablas objektivite konsideri skandalon, kiu malhonoras nian juĝistaron,

mi esperas, ke mi povos vin voki, kiam estos starigita la asocio, kiun mi planas por la revizio de l' proceso Landru. Mi scias, kie kontakti vin. Viaflanke, vi havas mian telefonnumeron...

En adiaŭa decido, ŝi malfermis sian manpoŝon, vokis la kelneron.

Ĉiu tiu parto aperas nur en la komplete versio de la libro. Mendu la kompletan libron de www.retbutiko.be.

-10-

Ĉiu tiu parto aperas nur en la kompleta versio de la libro. Mendu la kompletan libron de www.retbutiko.be.

-11-

Ĉiu tiu parto aperas nur en la kompleta versio de la libro. Mendu la kompletan libron de www.retbutiko.be.

-12-

Ĉiu tiu parto aperas nur en la komplete versio de la libro. Mendu la kompletan libron de www.retbutiko.be.

-13-

Ĉiu tiu parto aperas nur en la kompleta versio de la libro. Mendu la kompletan libron de www.retbutiko.be.

-14-

Ĉiu tiu parto aperas nur en la kompleta versio de la libro. Mendu la kompletan libron de www.retbutiko.be.

-15-

Ĉiu tiu parto aperas nur en la komplete versio de la libro. Mendu la kompletan libron de www.retbutiko.be.

-16-

Ĉiu tiu parto aperas nur en la kompleta versio de la libro. Mendu la kompletan libron de www.retbutiko.be.

-17-

Ĉiu tiu parto aperas nur en la kompleta versio de la libro. Mendu la kompletan libron de www.retbutiko.be.

-18-

Ĉiu tiu parto aperas nur en la kompleta versio de la libro. Mendu la kompletan libron de www.retbutiko.be.

-19-

Ĉiu tiu parto aperas nur en la kompleta versio de la libro. Mendu la kompletan libron de www.retbutiko.be.

-20-

Ĉiu tiu parto aperas nur en la kompleta versio de la libro. Mendu la kompletan libron de www.retbutiko.be.

-21-

Ĉiu tiu parto aperas nur en la kompleta versio de la libro. Mendu la kompletan libron de www.retbutiko.be.

-22-

Ĉiu tiu parto aperas nur en la komplete versio de la libro. Mendu la kompletan libron de www.retbutiko.be.

Epilogo

Ĉiu tiu parto aperas nur en la kompleta versio de la libro. Mendu la kompletan libron de www.retbutiko.be.

Biografio kaj komentario

Jean Louis Mahé, kies naskiĝ(?)dato kuŝas en 1911, malgraŭ aborto – kredeble fuŝita abortigo – ekvivis nur en 1912. Li estis franca reklamfotisto kaj vivis en Vitry apud Parizo. Li iĝis esperantisto en 1928.

En 1937 li faris unuan, neniam utiligitan propagandofilmon: "Antaŭen". Li faris ankaŭ la unuan teatran filmon kun dialogoj en Esperanto: "Angoroj". Anonco pri ĝi en MONATO 9/88 atestas pri ioma elreviĝo eble jam ne raraĵo ĉe esperantistoj pelataj de dumviva idealismo, sed malĝojaj pro la multaj fuŝoj, miskomprenoj, nelojalaĵoj, fikritikoj kaj enviaĵoj, bedaŭrinde propraj al la homaro kaj evidente ne maloftaj ankaŭ en Esperantujo.

Ja plurfoje subaŭdiĝas amaro kaj seniluziiĝo pri la konduto de esperantanoj. Ĉu citi el letero de 15-9-1988?

"Mi ricevis de S-ro Peeraerts (direktoro de FEL) surprizan kontrakton, kiu resimpatiiĝis al mi la eldonistan mondon. Surprizan kaj agrablan, ĉar el tiu medio, kiu faris profitojn per mia laboro (Eŭlalia: 5000 ekzempleroj), mi neniam ricevis unu frankon. Dankon! Ĝis Flandra Esperanto-Ligo, neniu iam pensis pri tio (por ne paroli pri la ŝtela utiligo de mia ruiniga filmo)."

El la Intervjuo en 1982 (*La Hungara Vivo*, 6/82) montriĝas "paralelo" kun sperto de la karmemora I. Lapenna, kiu neniam kabeiĝis, sed estis ankaŭ kruele batita, kaj iel nevole ranĝita sur "novan" trakon.

Malgraŭ malinstigoj, Lorjak tamen verkis multe. Ni povas bedaŭri, ke la legindaj eldonaĵoj "Retoj" kaj "Mariagnes" aperis aspekte nedorlotitaj, dum pri la bela kaj inda "Regulus" oni preterlasis korektadon.

La verkaron de Lorjak karakterizas interesaj intrigoj, enhavo matura, flagra spriteco, verva ardo, kaj oftaj amuzaj aludoj al la Esperanta kulturo. La aŭtoro montriĝas fajna psikologo kaj tiel lerta rakontanto ke li facile akceptigas kaj preskaŭ "verŝajnigas" eĉ la plej neatenditajn turniĝojn en siaj historioj.

Se li kabeiĝis ⁷ dum 15 jaroj, li nek karolpiĉis ⁸ (propradire), nek (ni alkoncedu) goldenumis ⁹ ; sed fakte kaj efektive abunde lorjakis ¹⁰ .

C. Declerck

Verkoj de Lorjak

1975 Neologisme *Fondumo (Helsinki)* Spionado de firmaoj

1976 Transe *Fondumo* Personec-interŝanĝo

1978 Retoj *Fondumo* Aventuroj kaj agado

1981 Regulus *L. Gabrielli (Roma)* Krime en la 17jarcenta Paris

1982 Iluzioj *HEA (Budapest)* Amuzaj noveloj

1984 Eŭlalia *HEA* Ege buntaj aventuroj

1986 Mariagnes *HEA* Flirta historio pri amrilato

1989 Kromosomoj *FEL (Antwerpen)* Ĉu ŝia edzo estas filo de Landru?

Notoj

[1](#) Mi neniam en mia vivo arogis al mi la rajton karolpiĉi vorton. Krom unu, nura, feliĉe tro fantazia por enpiviĉi: "diversipuladoj" (Mariagnes, p. 96).

[2](#) Mrs [misiz]: S-ino

[3](#) Rue Royale: Reĝa Strato

[4](#) *Ich verstehe nicht!*- Mi ne komprenas!

[5](#) The Universal Enriching of Animals: La universala pliriĉigo de bestoj.

[6](#) Les Champs Elysées, la elizeaj kampoj, luksa avenuo.

[7](#) kabeiĝi: subite kaj abrupte forlasi la movadon malgraŭ esperantista eminenteco (kiel Kabe, aŭ Kazimierz Bein).

[8](#) karolpiĉi: uzi multajn neologismojn kiel Karolo Piĉ.

[9](#) goldenumi: superŝuti la gazetaron per artikoloj; aperigi multajn tekstojn, ofte eĉ la samajn, plurloke samtempe (kiel Bernard Golden).

[10](#) lorjaki: sprite, verve amuzi kiel Lorjak.

Kolofono

Titolo: Kromosomoj

Aŭtoro: Lorjak

Desegnaĵoj: G. C. Mangini (kovrilpaĝe) kaj Herman R.M. Declerck (fine)

Editoris: Christian R. A. Declerck

Serio Stafeto n-ro 10

Kovrilo: Hugo Fontyn

ISBN de la papera eldono: 90 71205 26 6

UDK: 82-3=089.2

NUR: 829

Leĝa depono de la papera eldono: D/1989/2924/2

Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekensstraat 169 - BE-2060 Antwerpen

www.retbutiko.be

© 2007 FEL, Antverpeno

Tiu ĉi ekzemplero de „Kromosomoj” estas nur provversio kaj rajtas esti libere kopiata.